

Ernest Naville, 4-a parto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 490, 1973.02.28 & 03.03

Cl.- Parolas Claude Gacond.

Dum kelkaj radioprelegoj ni interesiĝas pri la vivo kaj penso de la ĝeneva filozofo Ernest Naville, kiu estis la unua honora prezidanto de Svisa Esperanto-Societo.

A.- Ernest Naville havis la privilegion vivi dum preskaŭ tuta jarcento. Naskiĝinta en 1816 li mortis en 1909 93-jaraĝa. La listo de liaj verkoj estas longa. Ernest Naville verkis pri la ĉi-sekvaj fakoj : filozofio kaj historio de la filozofio, fizikaj kaj naturaj sciencoj, religio kaj moralo, sociaj demandoj, balota reformo, edukado, biografioj, bibliografio, poezio.

Cl.- La vasta publiko en Ĝenevo kaj franclingva Svislando vidis en Ernest Naville antaŭ ĉio la kristanan apologiiston. Kiam Ernest Naville prononcis siajn paroladojn pri religiaj temoj, miloj da homoj alkuris por lin aŭskulti. En Ĝenevo, Lausanne kaj Neuchâtel tiu publiko eĉ ne trovis sufiĉe da loko en la ĉefa preĝejo.

A.- Tiuj paroladoj pritraktis la ĉi-sekvajn temojn : *La eterna vivo, La ĉiela Patro, La Devo*. Tiu lasta prelegaro estis tradukita esperanten. En siaj religiaj verkoj Ernest Naville sin malpermesis serĉi la originalecon. Ni citu lin: «*Mi staras antaŭ vi nur por prononci banalaĵojn. [...] La banalaĵoj estas la saĝo de la homaro.* » Pro tiu simpleco kaj pro lia oratora talento li havis tiom da sukceso. Sed lia influo estis nur efemera. Jam je la fino de lia vivo liaj verkoj ŝajnis eksmodaj eĉ al kristanoj.

Cl.- Ernest Naville rifuzis nome de la kristanismo sin klini antaŭ la juna, kaprica kaj moviĝema idolo **moderneco**. Filozofie li akceptis la dualecon animo-korpo aŭ spirito-materio. Li kondamnis la materiismon. La Dio proklamita de Jesuo-Kristo estis por li la konscienco, kies eterna volo esprimiĝas en la homo en la sento de la devo.

A.- La svisaj verkistoj Henri-Frédéric Amiel kaj Eugène Rambert, kiuj admiris lian oratoran talenton kaj la klarecon de lia stilo, faris pri lia penso kritikojn, kiuj montriĝis tute pravaj. Ili vidis en Ernest Naville skolastikiston, kiu restis absolute fremda al la ĉefa malkovro de la 19-a jarcento : tio estas al la evoluismo. Kvankam Ernest Naville multon skribis pri la sciencoj, li ne komprenis la gravecon de la malkovroj de Lamark kaj Darwin.

Cl.- La firmeco de Ernest Naville en la defendo de tute ortodoksa kristanismo trankviligis milojn kaj milojn da protestantoj kaj katolikoj. Eugène Rambert faris pravan kritikon, kiam li skribis, ke Ernest Naville pere de sia aŭtoritato subpremendis milojn da ĝermoj de sendependa penso.

A.- Tamen Ernest Naville diskonigis novajn ideojn. Li celadis toleremon malgraŭ la dividoj, opiniante, ke enprofundiĝo en la komunan fundamenton de la kristanismo kondukas al unueco. Kun kuraĝo li ĉiam kontraŭstaris la religian persekutadon. Kiam en Ĝenevo la praktiko de la katolikismo estis subite malpermesita de la registaro kaj la katolika preĝejo proklamita posedaĵo de la ŝtato, la protestanto Ernest Naville fariĝis la advokato de la persekutataj katolikoj. Same li defendis la membrojn de la salut-armeo, kiam la urbaj aŭtoritatoj persekutis tiun sekton. Por Ernest Naville ekumenismo estas atingebla nur tra la pens-libereco kaj respekto de la malplimultoj.

Cl.- Ernest Naville opiniis, ke ju pli la kristanoj enprofundiĝos en la komunan fundamenton de la kristana fido, des pli ili sentos sin en komunio kun ĉiuj aliaj, kvankam la kutimoj ilin disigas. Li alvokis la kristanojn al orkestritaj agadoj, kies plenumado povus konkretigi la unuecon de la kristana mondo.

A.- Inter tiuj agadoj ni menciuj la luktadon kontraŭ la sklaveco, kontraŭ la alkoolismo, la celadon al paco pere de internacia arbitrado de la internaciaj konfliktoj kaj pere de transformo de la armeoj en brigadoj por konstruiga civila laboro. Ernest Naville proponis balot-sistemon, kiu favoras la reprezentadon de la minoritatoj. Jam ekde 1866, tio estas 21 jarojn antaŭ la naskiĝo de Esperanto, li alvenis al la ideo, ke universala planlingvo estas necesa, kaj poste li fariĝis nelacigebla propagandisto por Esperanto.

Cl.- En la verkoj de Edmond Privat kaj Hector Hodler oni retrovas tiujn ideojn. Ni jam raportis, ke inter 1903 kaj 1906 la junaj Privat kaj Hodler estis invitataj ĉiusemajne viziti la maljunan filozofon en lia hejmo. Ernest Naville kapablis entuziasmigi siajn junajn disĉiplojn por tiuj agadoj, komprenigante al ili, ke oni ne devas vidi en ili nerealigeblajn utopiaĵojn.

A.- Se Svislando akiris socian ekvilibron malgraŭ siaj lingva kaj religia diversecoj, estas grandparte dank'al la proporcia balotado, kiun diskonigis Ernest Naville kun nelacigebla energio. Se Esperanto tiel facile disvastiĝis en franclingvan Svislandon komence de la 20-a jarcento, ankaŭ estas dank'al la influo de Ernest Naville. Kaj se post la unua mondmilito Ĝenevo estis elektita kiel sidejo de Ligo de Nacioj, ankaŭ estas parte pro la pozitiva influo de Ernest Naville.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando pri la penso de la ĝeneva filozofo Ernest Naville. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!